JB
EU3
NL/
-T1
E9
N6
09

NOTO POR KONTRIBUONTOJ

Eble vi rimarkas ke kontribuaĵo sendita al JEN aperas en via poŝtkesto post longa, eĉ duonjara tempopaso. Unu el la kialoj estas manko je personoj kaj rimedoj por fari la necesan tajpadon. Tial, ni esperas ke "memtajp-sistemo" povas pli efikigi la aperadon de la bulteno. Laŭ ĉi tiu sistemo, la verkanto mem pretigas sian verkaĵon por fotokopiiĝo. Sendu la verkon al la redaktanto kun noto pri ĉu vi mem povas tajpi la artikolon, kaj se jes, ni korektos kaj sendos ĝin al vi por fina tajpado. Por fotokopiiĝo, nur facila tajpado sur ordinaran paperon estas necesa. Tiel ni esperas ke venontjare vi ne ricevos antaŭinformojn pri la ELNA-Kongreso post ĝia okazo.

JEN-BULTENO

3/1969

Redaktis:
Robert N. Rothenmeyer

Materialon por
aperigo sendu al:

Robert N. Rothenmeyer
73 Old South Street
Northampton,
Mass. 01060

LA ELNA-KONGRESO DE 1969

La ELNA-Kongreso de 1969, en North Adams, Massachusetts, estis klimakso de tri-semajna Esperanto-kurso okazinta ĉe North Adams State College. La kurson, instruatan de Duncan Charters, lektoro ĉe Indiana Universitato, partoprenis 29 studentoj el diversaj lokoj. Ĝi estis aklamata tia sukceso ke la kolegio intencas okazigi Esperanto-kurson denove.

D-ro Mario Pei, profesoro ĉe Universitato Columbia, faris paroladon, en kiu li apogis proponon de George Hecht, eldonanto de "Parents' Magazine". Hecht proponis ke oni oficiale subtenu la plej popularan nacian lingvon, la anglan, kaj la plej popularan artefaritan, Esperanton (la plej popularaj laŭ opini-enketoj), kiel internaciajn lingvojn. Oni ĉie

---

Sur la kovropaĝo: Prof. Mario Pei alvenas al la ELNA-Kongreso, 1969

devus studi aŭ la anglan aŭ Esperanton. Tial ekzistus dulingva mondo, kiun d-ro Pei komparis al la regado de kaj la greka kaj la latina lingvoj sub la Roma Imperio. D-ro Pei konjektis ke, se kaj la angla kaj Esperanto estos oficiale instruataj, Esperanto pli gajnos ol la angla.

La propono de Hecht kaj Pei kaŭzis viglan disputon inter la kongresanoj, inkluzive de la estraranoj de ELNA. Unuj, dirante ke ĉi tiu estas eble la lasta okazo por venigi la verdan venkon, volis ke la Kongreso aprobu la proponon, pro la rezultonta prestiĝa kaj materiala helpo al Esperanto de la eminentaj proponintoj. Aliaj protestis ke ili "ne venis al Esperanto-kongreso por adopti rezoluciojn favorajn al la angla lingvo." Fine la kongreso (kompreneble) kompromisis per dolĉa kaj sendanĝera esprimo de gratula'interesiĝo. (Kelkajn semajnojn poste, s-ro Hecht mem forlasis sian proponon.)

Post la kongres-bankedo, oni prezentis neplanitan ridindan satiraĵon pri la ĵus finiĝinta kurso kaj mallongan teatraĵon.

DEZIRAS KORESPONDI EL ĈEĤOSLOVAKIO:

*Vítek František (poŝtmark-kolektanto)
Švernova 18
OSTRAVA 2, ĈEĤOSLOVAKIO

Instruistino, 23-jara, interesata de muziko kaj sporto:
*Libuše Hájková
Dukels. hradinů 527
ROŽNOV P.R., OKRES VSETIN, ĈEĤOSLOVAKIO

POEMO

Cornel Lengyel

Cornel Lengyel sugestis al JEN ke ni penu traduki iujn el liaj elektitaj poemoj. Verkisto kun diversaj talentoj, Lengyel per siaj verkoj en dramo, poezio, kaj pri Usona historio, gajnis laŭdon de kritikistoj kaj multajn premiojn. Liaj libroj inkluzivas Four Days in July kiu estas vaste aklamata rekreo de la homoj kaj okazoj [illegible]alantaŭ la "Deklaro pri Sendependiĝo", I, Benedict Arnold: The Anatomy of Treason, kaj American Presidents from George Washington to John F. Kennedy. Liaj premioj inkluzivas la premion Maxwell Anderson por poezia dramo kaj la premion Alfred M. Bender pri literaturo.

Tablo-kanto

Sidigis mi trans mia tablo
La malamikon por nutraĵ'
La panon multobligis li
Kaj faris vinon el trinkaĵ!

Amiko trans la tablo sidas,
Al manĝi mi invitis lin.
Renversis li sur min la tablon,
Per mia sango nutris sin.

- - - -

NOVAN LIBROKATALOGON eldonis la du ĉefaj usonaj liboservoj Esperantaj. La katalogo, kiu inkluzivas la diversajn titolojn sub pluraj ĝeneralaj kategorioj, kun klarigaj notoj, estas havebla de la liboservoj kontraŭ 25 cendoj.

KELKAJ PENSOJ DUM LA KOMENCIĜO DE LA JUDA NOVA JARO, 5730

Thomas H. Goodman

Je la 1-a de tiŝrio, 5730
(Je la 13-a de septembro, 1969)

Ĉi tiu skribaĵo eble ne presitaĵiĝos antaŭ la komenciĝo de la kristana nova jaro, 1970--sed ĉar la pensoj ne rilatas la arbitrajn periodojn de tempo sammaniere kiel ili ne rilatas la ritajn diferencojn inter religioj, ili devus esti samvaloraj kiam ajn ili aperos. Kiel la eksono de la korno de virŝafo estis simbolo de la "voko al konscienco", tiel ankaŭ la paroloj de la rabeno estis pripensigilo je la vivdaŭro--kaj mi skribas kelkajn el miaj pensoj.

La rabeno komencis sian predikon citante skribaĉon sur muro ĉe la Universitato de Kembriĝo en Anglujo: "HODIAŬ ESTAS LA UNUA TAGO DE LA CETERO DE VIA VIVO." Pensu pri la sugestioj de tiu signifplena frazo! Unue, ni ne devus prilamenti la erarojn kiujn ni faris; anstataŭe, ni devus vivi konstrue per lerni kiel ni povus pli efike agi eke de nun. Ni povos komenci malpliigi la grandajn sociajn problemojn de la mondo nur post kiam ni prenos ligadojn sur nin--kaj, agante tiele, ni kontribuos necesajn celojn al niaj vivoj. John W. Gardner diris: "La plej bone gardata sekreto en Usono hodiaŭ estas ke la popolo preferus laboregadi por kaŭzo ol ĝuadi dorlotatan senokupecon." Aliuloj estas dirintaj ke "necesas vivi *por* io kaj ne nur *per* io."

La rabeno ne parolis tamen pri nur solvi grandajn

problemojn. Li ankaŭ diris ke necesas plivalorigi la aferojn de niaj vivoj kiuj estas proksimaj, simplaj, kaj ofte ĉiutagaj. Ekzemple, ni devus plezuriĝi ĉe la beleco de aŭtuna tago, ni devus kelkfoje rigardi la sunsubiron, ni devus paroli al infano pri "io aŭ nenio", ni devus skribi al amiko, ni devus krei iun utilan objekton, ktp. Antoine de Saint-Exupéry substrekis la gravecon de persona ligado per sia libro "La Malgranda Princo", kie li skribis: "Oni konas nur la aĵojn kiujn oni enligas . . ." kaj "Oni povas bone vidi nur per la koro; la gravo ne estas videbla je la okuloj." Ni ĉiuj povas vivi pli produkteme, sed kelkfoje ĉi tia plenumado necesigas konscion de la pasado de tempo kaj sekve ŝanĝitan direkton de entrepreno. Kaj tie estas la miraklo de la eterna vero: "HODIAŬ ESTAS LA UNUA TAGO DE LA CETERO DE VIA VIVO"--ĉar ĉiu tago estas nova komenciĝo en la kontinueco de vivado, kaj oni ĉiam povas peni denove!

DEZIRAS KORESPONDI EL BRAZILO:

Pri maŝinoj, precipe aviadiloj, kaj lingvo:
*Valdemir Esaere
Cadete Z11-69
ZC-33 GUANABARA, RIO DE JANEIRO, BRAZILO

Radioamatoro (PY7-AJB) en nordorienta Brazilo volas interŝanĝi ĵurnalojn, gazetojn, librojn:
*Geraldo Pires Sitônio
Rua São Gabriel-s/nº
CARUARU, PERNAMBUCO, BRAZILO

LA FARAONO, de BOLESLAV PRUS — Recenzis, Peter J. Benson

Tiu ĉi romano surprizas la leganton plurajn fojojn. Ĝi estis originale eldonita en la pola lingvo en 1895, sed ĝia ĝenerala tono precize spegulas nian hodiaŭan socion. Ne nur tio, sed la rakonto situas antaŭ tri mil jaroj, en Egiptujo. La leganto vivas la vivon de tiuj antikvuloj, kaj oni sentas samtempe ke la rakonto estas vera bildigo de la tiama kulturo kaj ke tamen estas nenia malakordo inter la tiama socio kaj nia hodiaŭa.

Ĝuste tio, fakte, estas la celo de la aŭtoro: montri la sensanĝecon de homa socio eĉ trans jarmiloj. Tion li faras tre lerte, sed la rakonto ne estas nur seka moraligado. La tuta afero estas tiel agadoplena kiel iu moderna paperbindita romano de mistero aŭ sciencfikcio.

Plue, la lingvaĵo de la tradukinto (Kazimierz Bein) estas klara kaj ĝusta; li evitas neologismojn kiam jama vorto sufiĉas egale bone. La verko do estas rekomendinda por tiuj kiuj ankoraŭ ne perfekte regas Esperanton, ĉar la legado irus sufiĉe rapide eĉ por lernanto ke oni ne perdus intereson. Ĝi estas sufiĉe longa ankaŭ -- fakte, tri volumoj -- do ĝi liveras ne nur bonan ekzercon por la lernanto sed ion substancan por la progresinta leganto.

Mi alte rekomendas ĝin al ĉiu.

//Esperanto Book Service, 2129 Elizabeth Street, San Carlos, Calif. 94070, aŭ Esperanto Book Center, 29 Windsor Road, Great Neck, N.Y. 11021. Prezo: 7 dolaroj.//

LA USONA HUMORO* John David Stone

La unua usona humoristo, kies verkoj estas pli ol rakontoj, estas Mark Twain. Li estis la unua, kiu pensante uzis la humoron por esprimi ideojn. La moderna usona humoro komenciĝis en li.

La legantaro de lia tempo ne unue komprenis tion. Oni kritikis kaj diskutis nur rakontojn liajn. Sed post multaj artikoloj kaj verkoj de Mark Twain, kiuj enhavis des malpli da rakontoj kaj estis des pli pesimaj ju pli maljuniĝis Mark Twain, la publiko komencis kompreni, ke la intenco de la humoro ne estas nur ridigi, sed ankaŭ pensigi. Ofte oni doloriĝis de la pensiganto; ekzemple Mark Twain skribis The Gilded Age (La Orumita Epoko), libro kiu parolis pri la skandaloj inter la registaro kaj komercistoj, kaj kelkajn verkojn pri la religio, kiuj igus ĉiajn Diokredantojn longe pensi, kaj kiujn tiel la malpensantula plejmulto malamis.

Kvankam Twain estis Kristano, li ankaŭ havis sian propran kredaron, kaj la disesto inter ili pesimuligis lin. Humoristoj, kaj aliaj kiuj intime studas la homaron, tre ofte estas pesimuloj, mi opinias.

Kiam mortis Mark Twain, la publiko pli kutimis akcepti lecionojn en humoro. Ambrose Bierce, kiu iel similis je pli urbana Mark Twain, povis skribi la rimarkindan lernlibron

---

*Prelego farita ĉe kunveno de la Societo pri la Internacia Lingvo, Universitato de Ĉikago, je 12 majo, 1969.

cinikan La Vortaro de Diablo, kiu enhavis ekzemplo la veran difinon de "komplimento": "Onia ĝentila agnosko de la simileco inter alia persono kaj oni mem." Kaj de "fraŭlo": "Persono, kiu ne unufoje eraras same." Kaj de "tedulo": "Oni, kiu amas aŭskulti paroli pli sin ol min." Kaj de "interligo": "Du personoj, kies manoj estas tiel profundaj en la poŝoj unu de la alia, ke ili ne povas aparte rabi trian personon." Bierce ankaŭ skribis pri religio kaj la usona registaro; sed nun personoj akceptis tion, kaj ridis.

Je la komenco de la nuna jarcento, la Irlandana, opinia Mr. Dooley, kreita rolulo de Peter Finley Dunne, komencis la periodan uzon de humoro por esprimi opiniojn pri aktualaj okazaĵoj. Mr. Dooley estis senfina fonto de opinioj pri, ekzemple, la viandpaka industrio, problemoj en la juĝada procedo en Usono, kaj la rajto konsideri alkoholon kiel specon de nutraĵo. Sinjoro Dunne estis tre kapabla verkisto, ĉar Mr. Dooley eĉ nun ŝajnas vere vivi.

La dudekaj kaj tridekaj jaroj de la jarcento estis lumataj de la Rondo Algonkvina, humoristaro novjorka enhavanta Dorothy Parker, Robert Benchley, Alexander Woollcott, kaj aliajn, kiuj verkis artikolojn kaj kritikojn humorajn en revuoj, unue La Novjorkano (The New Yorker); de la eldono de la tre homaj rakontoj de Ring Lardner; kaj de la ofta uzo, unuafoje, de bildoj por la humoro. Malfacile estas imagi mondon sen desegnaĵoj; sed oni povas ekzisti sen endoma tubakvo kaj ekskursoj al la Luno, mi supozas; do ankaŭ tio povestas.

Ĉi-tempe, alia verkisto notiĝis, en la formo de blato nomita Archy. Archy, la kreaĵo de Don Marquis, komunikis nur malfacile; li devis labore grimpi sur la skribmaŝinon kaj

ĵeti sin sur la klavon, kiun li volis pusi, por produkti ĉiun literon. La rezulto indis la laboron; Alchy iĝis la unua parolanto por la tuta insekta mondo. Li "vidis de la suba flanko," en siaj vortoj, la malsaĝecon de la homaro, kaj la maldaŭron. Li diris, "Ĉiu havas du specojn de amikoj; unu speco penas decidi aferojn por li kaj la alia speco do, nun ŝajnas ke mi ne povas memori la alian specon"; kaj, "Se vi malĝojiĝas, nu, sidu unu horon kaj pensu, ke ĉial tiu mondo estas tre pli bona ol la infero; kompreneble, tio ne reĝojigos vin se vi atendas tien iri."

La humoro havas du specojn, la malatenditan kaj la koincidantan. Unu formo de la unua speco estas la "non sequitur," kio latine signifas "ĝi ne sekvas." (Vi eble vidas ke la latina kaj Esperanto estas parencaj.) Tio estas la kunigo de du ideoj tute malsimilaj. Robert Benchley ofte uzis tion; ekzemple, kiam lia rolulo tro drinkas, lia kapo flugas al la plafono, kaj liaj dentoj falas kaj sur la planko literas "Portage High School, 1933." Neniu, nek la rolulo nek la leganto, konas Portage High School. La rakonto neniel prias Portage High School. Kial literas la dentoj tion? Ĉar la rakonto neniel prias ĝin--tiel estas la non sequitur.

Sed la vera majstro de la non sequitur estas la moderna verkisto S. J. Perelman. Liaj herooj estas malkredeblaj miksoj de la pleja ridindo de vera vivo kaj la pleja bono de lia imagemo. Mi ne havas la tempon por legi al vi el liaj verkoj, sed mi rekomendas ilin al vi.

La invento de la radio kaj la televido reduktis la humoron al la stato, kie ĝi estis antaŭ Mark Twain, tio estas, nur rakontoj, escepte kelkajn verkistojn, ekzemple James Thurber

kaj Dan Greenberg, kies verkojn kelkaj legas. La televido, kiu estas nur vendejo de la dudek-miliard dolara reklama industrio, malaltigis la guston de la publiko. Je nia epoko, do, la usona humoro, kiel ni konas ĝin, eble venas al fino.

Glosoj: pesimo—la eco de pesimisto,
Portage High School—Gimnazio Portage.

AMUZU VIAJN AMIKOJN!
MALAMUZU VIAJN MALAMIKOJN!

Algluu HIPMARKOJN sur viajn kovertojn! Ĉiu folio havas po 30 diversajn ilustritajn HIPMARKOJN: politikajn ("KROKODILOJ GO HOME!"), kulturajn ("JARO DE INTERNACIA FRENEZO"), religiajn ("SAVU MALSAMIDEANOJN!"), turismajn ("VIZITU Volapükujon"), kaj aliajn (inkluzive iujn seksajn) kiujn ni eĉ ne kuraĝas citi!

Prezo: tuta granda folio kun 30 HIPMARKOJ kostas nur 50 cendojn. Se vi samtempe mendas 10 foliojn aŭ pli, la prezo estas nur po 30 cendoj por ĉiu folio. Ni pagas la afrankon tutmonden.

Ne ekzistas granda kvanto! Mendu nun de:
International Language Society
University of Chicago
1212 East 59th Street
Chicago, Illinois 60637

PROTEKTU KANGURUOJN!




La Reĝo de Umo
Kio estastio kio tiel bruege pretŭrpasas la kastelon?
PAROLU LA UMAN
Oni kaptis ankoraŭ unu Usemulon
Ho ve! Ĉu neniam solviĝos la Usa problemo?
Fakte lasttempe en la ĉi-jara Lingva Kongreso proponiĝis fina solvo de la konflikto inter la Usa kaj Nia Karega, Verdega Dialekto (NKVD)
Mirinde
Oni kion proponas, ĉu leĝon pri senmandata elektronika subaŭskultado?
Ne, ne
La Papago
Ĉu do speciala policfako por klopodi kontraŭ uslingvaj stratbandoj?
Ne, ne
Kio do estas la solvo fina proponita?
La ekoficialigo de la Usa kune kun la Umo.
La ekkio?!!!
Ŭ
O
m
P
Nenio pli obstinas ol baroj...
krom eble Usemuloj

LA PATRO DE LA RENASKIĜINTA HEBREA LINGVO (2) Michael Larkin

Post 1850 la reviviĝado de la hebrea (kiel skribita lingvo) estis bone komencita. Poetoj kaj eĉ aŭtoroj aperadis, kaj en ĉiu eĉ meze granda urbo oni eldonis hebrelingve gazetojn periodajn.

Unu el la plej bonaj estis הַשַּׁחַר "Ha-Ŝaĥar"(La Tagiĝo) eldonita de rusa judo loĝanta en Vieno. Unu tagon li ricevis artikolon nomitan "Brulanta Demando" de nekonata juda medicina studento en Parizo, kiu ĝin sendis sub la pseŭdonomo "Ben Jehuda" (filo de Judao). Ben Jehuda ne estis religiemulo,sed li neniam permesis ke lia scio de la hebrea mankiĝu, kaj oni diras ke li eĉ abonis ĉiujn gazetojn en tiu lingvo. Lia artikolo proponis ke se ĝenerala juda reiro al Palestino okazos, tiuj judoj forlasu la lingvojn de ekzilo kaj parolu la hebrean. Tiu estis konsiderata radikala sugesto. Ne permesu ke iu ajn diru al vi ke la hebrea estas facila lingvo, kaj iu ajn, eble escepte de denaskiĝa hebrelingvulo, konsentus pri ĝia malfacileco se li iam ajn ĝin studis.

Tamen, preskaŭ ĉiu virjudo povis almenaŭ legi iom de la sankta hebrea pro religiaj kialoj. Sed malgraŭ tio, la lingvo ne plu estis la gepatra kaj ĝi malhavis milojn da terminoj pri ĉiu fako de la moderna vivo.

Ben Jehuda komencis korekti tion. Li decidis iri al Palestino kaj labori por la fondado de juda hejmlando. Al li la plej grava afero ne ŝajnis esti la akiro de ĉi tiu aŭ tiu ero de tero, sed unuigi la popolon pere de komuna lingvo, kiu liaopinie estu la hebrea. Sed por plenumi tian revon la lingvo devis havigi multe pli vastan aron da vortoj.

Ben Jehuda ekkomencis la laboron--kompiladon de multampleksa vortarego kun terminoj por ĉiu fako de la vivo moderna. La verkado estis eĉ pli konsiderinda ol oni opinius, ĉar Ben Jehuda estis la unua kompilanto de vortaro en la hebrea. Tamen, li estis preskaŭ fanatikulo pri sia projekto kaj iom post iom la verko plenkreskis.

Post la alveno ĉe Palestino, Ben Jehuda instruis ĉe instruista kolegio. En siaj klasoj li eksperimentis kun la hebrea per ofte paroli en ĝi al la studentoj. Ĉiam li spertis multajn problemojn pro la vortmanko de modernaj terminoj. Kiel oni dirus mikroskopon, aŭ eĉ krajonon hebree? Por korekti tion Ben Jehuda unue provis uzi ĉirkaŭfrazojn kiel la fruaj hebreaj gazetoj, sed tio tute malsufiĉis. Sed li ne estis malkuraĝigita. Li komencis konstrui novajn vortojn laŭ la hebrea gramatika sistemo kaj doni novajn signifojn al malnovegaj vortoj.

Tio tute malplaĉis multajn religiajn fanatikulojn kiuj diris ke li prostituas la Dian Lingvon, kiu estas tro sankta uzi en la ĉiutaga vivo. Tion Ben Jehuda trovis nekredebla kaj ne ŝancelis en sia deziro savi la lingvon. Li febre laboris pri

la projekto. Unu interesaĵo--kompilante la vortaron li trovis ke ne ekzistas hebree la vorto "vortaro!" Do, li elpensis ĝin מִלּוֹן (milon).

Kvankam li ne povis uzi nur la hebrean instruante ĉe la kolegio, la hejmo de Ben Jehuda aŭdis nenian alian lingvon. Antaŭ la edziĝo li informis sian fianĉinon ke en Palestino ili parolos nur hebree. Oni ne opinius, kiel eble le edziniĝonto, ke li estis vere serioza. Tamen, kiam ili alvenis ĉe la nova hejmlando li plenumis la promeson. Se la edzino ekdiris ion ruse aŭ jide (siaj antaŭaj lingvoj) li ignoris ŝin. Eble nun edzino eksedzigus la edzon pro io kiel tio, sed tiam la virinoj ĉiam obeis la edzojn.

Je la naskiĝo de filo, Ben Jehuda estis feliĉega. Li nomis lin "Ben Cion" (filo de Ciono). Ben Jehuda penis de longa tempo instrui la knabeton paroli, sed li estis malrapidlernulo. Finfine, post tri turmentaj jaroj, li komencis paroli.

Ben Jehuda daŭris labori febre. Li estis malsana pro tuberkulozo kaj treege volis kompletigi la vortaron. Tiam, subite, post la naskiĝo de dua filo, la edzino mortis. Ŝi infektiĝis per la malsano de la edzo.

Preskaŭ iu ajn homo forrezignus, sed ne Ben Jehuda. Li skribis al la fratino de sia mortinta edzino kaj ŝi konsentis iri al Palestino kie ili estis geedzigitaj.

Fine homoj komencis kompreni la valoron de la hebrea je la unueco kiun la juda ŝtato havu. La lingvo gajnis pli da subteno, pli da parolantoj. Ben Jehuda eĉ fondis Hebrean Lingvan Akademion kiu nun estas sekcio de la Israela registaro kies lingvaj decidoj estas leĝoj. Modernaj libroj tradukiĝis en ĝin. Cionismo plifortiĝis, ĉio pliboniĝis.

Tiam, dum 1922 Ben Jehuda mortis. Li neniam povis finigi la vortaron, li ekmortis kiam li alvenis ĉe la vorto "נֶפֶשׁ" (napfŝi--animo). Li neniam vidis la sukceson kiun la hebrea fine ĝuis.

Estas bedaŭrinde ke li ne povis vidi la miraklon kiun li faris. Sed malgraŭ ĉio, la hebrea neniam povus esti vivigita sendepende de la fondo de Israelo. Vere, ni esperantistoj faris propran miraklon- vivan lingvon, sen nacio, sen etna parolpopolo. Kio okazos kiam urboj parolos esperanton?

(fino)

DEZIRAS KORESPONDI:

Aleksandro S. Vasin, Pr. Semaŝko 46 kv. 1, ROSTOV-NA-DONU, SOVET-UNIO.

20-jaraĝa komencanto, interesata pri arto (pentrado kaj desegnado): Karlo Kovács, BKKU, Béke-tés-5, KECEL, HUNGARUJO.

NOVA VORTARO ANGLA-ESPERANTA FETIĜAS

Peter J. Benson

Ĉu iam vin konsternis tio, ke la "plej bona" angla-Esperanta vortaro ne listigas tiel oftajn anglajn vortojn kiel radio, skillet, mimeograph, diaper (ankaŭ nappie!), movie, suitcase, kaj miloj pli? Ke ĝi enhavas oftajn erarojn je tiuj vortoj kiujn ĝi ja tradukas? Ke sinjoroj F.kaj L. ekverkis ĝin en 1910, kaj eldonis ĝin en 1921 (dek tri jarojn antaŭ la apero de la Plena Vortaro!)?

Kuraĝiĝu! Nova kompleta angla-Esperanta vortaro venas! Ĝi estos bazita sur la Plena Illustrita Vortaro, kompreneble, kaj ĝi estos verkita tute nove, ne nur per aldoni iujn novajn vortojn al iu jam ekzistanta vortaro.

Kvankam la vortaro estas nun nur en la unuaj etapoj, ĉiu sentu libera skribi al mi pri iu manko en jamaj vortaroj kiu aparte ĝenas. Per tia retrofluado mi eble povos eviti la saman eraron. (Peter J. Benson, 23 Mardrew Road, Baltimore, Md. 21229.)

--- - - - - -

NOTU. English Universities Press ĵus eldonis novan ambaŭdirektan vortaron en la fama serio Teach Yourself (Teach Yourself Esperanto, de Cresswell kaj Hartley, estas libro en tiu sama serio). La vortaro, kompilita de docento ĉe la Londona Universitato, John Wells, prezentas kompreneble britan anglan lingvon, sed estas pli kompleta kaj moderna, ol antaŭaj tiaj vortaroj.

LA ESPERANTO-JUNULARO : RACIAJ INTERNACIISTOJ

"Reciprokaj kompreno kaj respekto nepras por kreado de paca mondo." Per tiaj grandesprimaj vortoj, Konferenco de Unesko pri la Junularo antaŭ kelkaj jaroj pritraktis la internacian komprenon. "Hodiaŭ," deklaris ĝia raporto, "la internacia vivo okupas ĉiam pligrandiĝantan lokon en la atento de la tuta junularo." Tiajn kontaktojn inter gejunuloj "malhelpas lingvaj diferencoj."

Tiuj, kiuj multe vojaĝis en aliaj landoj, aŭ multe kontaktis kun alilandanoj, scias, ke la vortoj de la Unesko-konferenco estas konsterne veraj. Vole-nevole, la nacioj estas hodiaŭ puŝataj al ĉiam kreskanta interkontaktado. Precipe la junularo tion spertas. La specialistoj atentigas nin, ke la batalo kontraŭ malriĉo, analfabetismo kaj malsano estas internacia batalo, en kiu nepras la harmonia kunlaboro de la nacioj.

Sed plej baza ilo de kunlaboro--la lingvo--mankas. Ni estas firme limigitaj al la propraj lingvogrupoj, mutaj antaŭ alilingvanoj. La gejunuloj en la Unesko-konferenco (kaj iliaj reprezentantoj) rekonis la sensencan perdon de energio pro lingvaj diferencoj, sed ne povis trovi bonan solvon. Ili rekomendis lingvo-lernadon, terminarojn, tradukadon--iom primitivaj kaj multekostaj rimedoj.

Sed unu grupo de gejunuloj solvis la problemon laŭ maniero racia kaj inteligenta. Tiu grupo estas la Esperanto-parolanta junularo.

En 1964, kiam okazis tiu konferenco en Grenoble, malmultaj gejunuloj en internaciaj medioj sciis pri la ekzisto de la internacia lingvo Esperanto. La esperantistoj ne estis invititaj partopreni la konferencon, kaj Esperanto ne

leviĝis en la diskutoj. Hodiaŭ, tamen, tiu situacio ŝanĝiĝis. Verŝajne la plimulto de junaj funkciuloj en internaciaj organizoj, eĉ se ili ne intime konas Esperanton, scias pri kio temas. Kaj ili ofte estas tre favoraj al la ideo de internacia lingvo kiel solvo de la monda lingvo-problemo. Parolantoj en internaciaj junularaj konferencoj ofte mencias la lingvon; aludoj al ĝi aperas en la junulara gazetaro.

Al kiu atribui tiun rimarkindan ŝanĝon? Precipe al Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. TEJO estas la ĉefa internacia organizo por junaj parolantoj de Esperanto, kun 23 landaj sekcioj kaj ĉirkaŭ 10.000 membroj. En la lastaj jaroj ĝi kreskis ĝis tiu staturo, post jaroj kiel malgranda klubeca organizo. La kresko ĉefe rezultis el saĝa gvidado kaj efika kanalizo de la junularaj idealoj. Tio respeguliĝas ekzemple en la eldonaĵoj de TEJO. Ĝi aperigas novaĵbultenojn en tri lingvoj (angla, franca, Esperanto). Ili estas distribuataj ankaŭ al junaj funkciuloj en internaciaj organizoj. Ĝi ankaŭ eldonas lukse ilustritan revuon, "Kontakto." Ĉar TEJO-anoj ne estas sektecaj lingvoamantoj, sed energiaj mondcivitanoj, ili dediĉas sian revuon ĝuste al mondaj problemoj--tiuj pri kiuj avertas nin la jam menciitaj specialistoj. TEJO-anoj dialogas pri tiuj problemoj trans la landlimoj. Ili praktikas internaciismon en la propra agado, per internacia vizitinterŝanĝo, renkontiĝoj, agado inter skoltoj kaj studentoj, ktp. Dank' al la saĝa kaj klarvida agado de TEJO-anoj, la vortoj TEJO kaj Esperanto estas hodiaŭ respektataj terminoj en internaciaj junularaj konferencoj. Tie ankaŭ delegitoj de TEJO regule partoprenas.

Rilatoj kun aliaj junularaj organizoj estas nur unu faceto de la agado de TEJO. Por ĝin subteni, aliĝu al TEJO kiel Patrona Membro, aŭ, se vi estas malpli ol 26-jara, kiel individua membro. Skribu por informoj al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando.

H. T.

A B O N U L A J U N U L A R A N R E V U O N

K O N T A K T O

K O N T R A Ŭ N U R $ 1. 5 0 !

Normale tiu ĉi luksa kvaronjara revuo kostas $2.50 por unujara abono.

Sed por plimultigi ĝian legantaron, kaj por certigi, ke ĉiu juna Esperanto-parolanto havu la eblecon aboni ĝin, oni reduktis la abonkotizon!

Se vi naskiĝis en la jaro 1945 aŭ pli poste, vi rajtas pagi la reduktitan kotizon. Pli aĝaj personoj devas pagi $2.50.

Kontakto estas plene internacia gazeto. Ĝi estas redaktata en Pollando, eldonata en Nederlando, kaj legata en tridek landoj. Ĝi pritraktas en taŭga formo la interesojn, problemojn kaj amuzojn de la internacia junularo. Kvankam ĝi precipe pritraktas neesperantistajn temojn, ek de 1970 ĝi ankaŭ enhavos parton dediĉitan al la Esperanto-junularo.

Plenigu la aliĝilon dorsflanke!

A B O N I L O

Al: Humphrey Tonkin, peranto de Kontakto, 2131 Tryon Street, Philadelphia, Pa. 19146.

Mi deziras aboni la revuon Kontakto kaj ĉi-kune alsendas monon / poŝtmarkojn / ĉekon (forstreku la netaŭgajn) por la jena sumo:

$1.50 (mi naskiĝis en 1945 aŭ poste) ▱

$2.50 ▱

Nomo:_____ Naskiĝjaro:_____

Adreso:_____

_____ Zip:_____

Ĉekojn pagigu al Humphrey Tonkin aŭ al Universala Esperanto-Asocio.

Kontakto estas eldonata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Junulara Sekcio de Universala Esperanto-Asocio.

DEZIRAS KORESPONDI

Brazilo: Jur-studento, 27-jara, deziras komuniki kun usonano pri usonaj kulturo, kutimoj, muziko, literaturo, ktp. Al tiuj kiuj respondas estas promesataj similaj informoj.
*Antenor Laurentino Ramos
RMA: Afrânio Peixoto, 1080
Barro Vermêzho
Natal-Rio Grande Do Norte, Brazilo.

Studento, 20-jara, deziras korespondi kun nordamerikano. Li kolektas fotografaĵojn kaj bildkartojn.
*José A. S. Filho
Rua: Joana Cuuha, No. 51
Santos Dumont-Minas, Brazilo.

Junulo 19-jara deziras korespondi kun usonano aŭ -ino pri ĉiuj temoj, precipe pri taga vivo, kaj preferas korespondanton el Nov-Jorko.
*S-ro Egon Breitenbach
C. P. 2844
Porto Alegre
Rio Grande do Sul, Brazilo

Bulgarujo: La jenaj deziras korespondi kun la tuta mondo pri diversaj temoj. Ili interesiĝas pri aŭtoj, sporto, gramofondiskoj, modo, medicino, moderna muziko, magnetofonoj, tranzistoroj, fotoj, filmoj, teatro, ktp.
*Nikola Dimitrov Gjurnev, 25-jara fraŭlo.
*Atanaska Dimitrova Gjurneva, 21-jara fraŭlino.
*Georgi Dimitrov Gjurnev, 16-jara ĉernanto.
Adreso: V. Baldevo, Distr. Blagoevgradski, Bulgarujo.

Ĉeĥoslovakujo: Membroj de la Esperanta Rondeto "Amikeco" deziras gekorespondantojn, 18 ĝis 28-jarajn kiuj ŝatas muzikon, teatron, naturon, librojn, k.t.p. La estro serĉas amikon aŭ amikinon kiu kolektas kaj deziras interŝanĝi kolorajn bildkartojn. Skribu al:

*Horymír Švarc
Estro de Esperanta rondeto AMIKECO
Polom 64a
Okres: Přerov
Ĉeĥoslovakujo.

Hungarujo: F-ino Berhidi Jolán gvidas malgrandan Esperanto-rondon. Ŝiaj gelernantoj estas 14-18 jaraj kaj deziras korespondi kun usonaj gejunuloj. Ili kolektas bildkartojn kaj ŝi kolektas paperbuŝtukojn.

*F-ino Berhidi Jolán
Budapest, XVII
Rákosliget, VIII u. 6
Hungarujo.

Italujo: 20-jara knabino deziras korespondi kun samideanoj 20- ĝis 22-jaraj.

*F-ino Lella Garau
Via Giusti No. 12
09100 CAGLIARI, SARDEGNA, ITALUJO

Japanujo: Studento, 21-jara, interesata de muzikaŭskultado, japanŝako, usona geografio, vivo, ktp.:

*Hasegaŭa Joŝihumi
484 Minamiseida, Uĉitaĉo
NAGAGUN, ŬAKOJANA-KEN 649-64, JAPANUJO

Laboristo, 21-jara, interesiĝas pri la vivo kaj penso de la usona popolo:
*Asada Iwao
1-10 Hamada-cho
MINAMI-KU, NAGOYA-SHI 457, JAPANUJO

Polujo: Esperanto-instruisto, interesata de fotografarto, deziras interŝanĝi fotojn kaj korespondi.
*S-ro Zdisław Błażejczyk
Skrytka pocztowa 226
GDAŃSK-6, POLUJO

Rumanujo: Anoj de grupo volas korespondi. Kontaktu:
*Ölvedi Karoly
Remetea 77
JUD. HARGHITA, RUMANUJO

Sovet-Unio: Multaj grupanoj volas korespondi. Gvidanto:
*Danielo Kolker
ul. Ĉumaĉenko 15-41
ZAPOROĴJE-58, UKRAJNO, SOVET-UNIO

Pedagogino serĉas korespondanton:
*Prof. Eva Ludmila
K. Markx - Strato 56
G. MELEOUZ, BAŜKIRIJA, SOVET-UNIO

VOJAĜU AL EŬROPO EN 1970!

La 26-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Graz, Aŭstrio.

Ĝi daŭros unu semajnon, de sabato 8 aŭgusto ĝis sabato 15 aŭgusto.

Ĉefa temo de la kongreso estos "Junularo kaj Lernejo."

Ankaŭ okazos ekskursoj, sportaj aranĝoj, kulturaj programeroj, kaj ĝenerala amuzado en agrabla atmosfero.

Partoprenos junaj Esperanto-parolantoj el dekkvino da landoj, inkluzive orientan Eŭropon.

Kotizoj estas ankoraŭ ne definitive fiksitaj, sed verŝajne estos inter 22 kaj 30 dolaroj, kio inkluzivos tranoktadojn, manĝojn kaj la kongresan programon.

La kongreso estos ne nur amuza, interesa kaj amuzoplena, sed ankaŭ malmultekosta!

Oni loĝos en moderna studenta loĝejo.

La kongreso okazos dum la semajno tuj post la Universala Kongreso De Esperanto, en Vieno. Dum la semajno post la IJK, verŝajne okazos plia junulara renkontiĝo en Hungario.

Informojn petu ĉe: 26-a IJK, Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz, Aŭstrio.

EN 1970 ALIĜU AL

U N I V E R S A L A E S P E R A N T O - A S O C I O

Kiel Membro-Abonanto de U.E.A. vi ricevos ĉiumonate la revuon Esperanto, ĉefa informilo pri la aktivecoj de la Esperanto-movado. Vi ankaŭ ricevos la Jarlibron, kiu enhavas adresaron de ĉiuj Esperanto-organizoj, informojn pri aĉeteblaj libroj kaj gazetoj, kalendaron, kaj aliajn utilaĵojn.

Se vi estas ankaŭ junulo maĝli ol 26-jara, vi ricevos ankaŭ la revuon Kontakto, kvaronjara junulara gazeto eldonata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, la junulara sekcio de U.E.A.

Vi ĝuos grandan rabaton en la kongreskotizoj de la Universala Kongreso de Esperanto kaj en la Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Ili okazos en 1970 en respektive Vieno kaj Graz.

Petu informojn pri U.E.A. ĉe:
Armin F. Doneis
Peranto, Universala Esperanto-Asocio
Box 105
Pharr, Texas 78577

La centra oficejo de Universala Esperanto-Asocio situas en la nederlanda urbo Rotterdam.

JEN
4 Central Street
Millers Falls, Mass. 01349

Return Requested
Address Correction Requested

DATED MATERIAL

Non-Profit Organization
U. S. POSTAGE
PAID
PERMIT NO. 5
MILLERS FALLS, MASS.
01349